# EKO 2025

Eduke en Brno kun ILEI

EKO 2025-29. Julio 10. Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Alkroĉaĵo Sume ? KB

## La tago de Lernado en Brno

Jen la programo por la Tago de Lernado en la UK en Brno, samtempe AMO-seminario.

09.00 Enkonduko kaj salutoj
09.10 Mireille Grosjean, CH: Ĉu ĉiuj esperantistoj estas efikaj 'pontoj'?
09.50 Fernando Maia Jr, BR: La potenco de kunlaboro en edukado por paco kaj konfido
10.30 Duncan Charters, US: Kiel profiti teknologion por paccelaj kulturaj interŝanĝoj
11.10 Bernhard Tuider, AT: Diĝitaj dokumentoj el la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko (11.50 paŭzo)
12.10 Libuše Hýblová, Ĉehio: La ĉeĥa eduksistemo
12.50 Ahmad Mamduhi, Irano: Esperanto kaj AI: pontoj al la paca mondo
13.20 Stela Besenyei-Merger, Hungario: Radikala Tenero - retaj babiladoj por interkultura lernado kaj internacia interkompreniĝo
13.50 Alessandra Madella, Italio: Kernaj Konceptoj de Komunikado
14.20 Jeremie Sabiyumva, Burundo: Kontribuo de Esperanto kaj teknologio en informado, kazo de Afriko. (14.50 Fermo)

***Pli da informoj:*** [***https://eventaservo.org/e/cd0fd1***](https://eventaservo.org/e/cd0fd1)
Marija Belošević, kunordigantino de la programo "Tago de Lernado"

## La julia menu de Ondo

Jen listo de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por julio 2025, kompilita de Aleksander Korĵenkov, kiu aperis en *La Ondo de Esperanto*. En la listo estas eminentaj forpasintoj (Fernando de Diego, Nicolina (Lina) Gabrielli, Vilmos Benczik k.a.) kaj niaj samtempuloj **Jouko Lindstedt** kaj **Tazio Carlevaro**, kiujn ni gratulas okaze de iliaj respektivaj 70-a kaj 80-a naskiĝdatrevenoj. La 26-an de julio ni festos ankaŭ la 138-jariĝon de Esperanto. Legu la liston ĉe https://sezonoj.ru/2025/07/julio-11/

## Forpasis JOSEP FRANQUESA I SOLÉ

Kun profunda bedaŭro, UEA informas pri la forpaso de Josep Franquesa i Solé (1936-2025) la 23-an de junio en la aĝo de 88 jaroj. Li estis Honora Membro de UEA, pro siaj gravaj kontribuoj al la movado en Katalunio, Hispanio kaj al la komerca aplikado de Esperanto kiel labor- kaj faklingvo. Josep naskiĝis en 1936 en San Feliu de Codines. Tie, li eklernis la internacian lingvon kiel adoleskulo. Profesie, li iĝis entreprenisto kaj havis longan komercan karieron sur multaj kampoj, ekzemple pri kokinbredado, varoj por aŭto-riparado kaj hidraŭlikaj ekipaĵoj. En tiu kariero, li disvolvis aktivan praktikadon pri aplikado de Esperanto en komerco; precipe por fari internaciajn kontaktojn, starigi

komercajn rilatojn kaj ekscii pri novaj sciencaj kaj teknikaj evoluoj. Li aktive agis en la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF). Por rakonti lian duonjarcentan agadon pri Esperanto kaj komerco, li verkis en 2023 la eseon *Malgranda estas bela, grava kaj interesa*.

Eltiraĵo el Gazetara Komuniko de UEA.

## La sukceso de la Hispana Eo-Kongreso

La 83-a Hispana Esperanto-Kongreso okazis komence de majo en la urbo Sorio. La aranĝon partoprenis pli ol 150 esperantistoj el ĉiuj regionoj de Hispanio kaj pluraj eŭropaj landoj, kun tre riĉa programo, tiel kultura kiel distra kaj organiza. Pri la evento raportis lokaj amaskomunikiloj, kaj ankaŭ la radio kaj la regiona televidstacio (ĉe ĉi tiu ligilo, ekde la 21:30). Se vi ne povis ĉeesti, vi povas legi raporton en Esperanto pri la evento ĉe ĉi tiu ligilo. Multaj fotoj, filmetoj kaj aliaj dokumentoj pri la kongreso nun haveblas en la Bitoteko de la Federacio ĉe ĉi tiu ligilo. Same, pluraj filmetoj estas publikigataj en la Jutuba kanalo de Hispana Esperanta Federacio, montrante kelkajn el la registritaj agadoj. Vi povas aliri ilin ĉe ĉi tiu ligilo. La sekva Hispana Esperanta Kongreso okazos en julio 2026 en la biskaja urbo Portugalete (tre proksima al Bilbao).

**Fonto: Bitbulteno 101 de la Hispana Eo-Federacio**

## Zamenhofa strato facile proklamita

Aperis nova artikolo en la retejo uea.facila.org, kiun prizorgas Anna Löwenstein kun siaj kunlaborantoj (https://uea.facila.org/kunlaborantoj/). La artikolon verkis Maurizio 'Rico' Giacometto kun titolo *La Zamenhof-strato*, kaj voĉlegis ĝin li mem. Temas pri verko de Roman Dobrzyński: https://uea.facila.org/artikoloj/libroservo/la-zamenhof-strato-r466/

## La 94-a Sumoo komenciĝos la 13-an de julio

Sumoo estas legkonkurso de Esperanto-libroj. Ĉiun tagon dum du semajnoj vi legos la libron, kiun vi mem elektos kaj la kvanton da paĝoj, kiun vi mem decidos, kun 300 esperantistoj en la mondo. Tiele vi povos legi librojn kuŝantajn en via libroŝranko.

Por pli scii, kio estas Sumoo, vidu nian retejon: http://www.esperanto-sumoo.pl/

**HORI Jasuo,** Retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp




## Plia atingo en Ĉinio

Ĝoje mi legis vian raporton pri la unua seminario pri Esperanta tradukado en la Zaozhuang-a Universitato. Tia evento montras la konkretan engaĝiĝon por kunligi lingvan edukadon kun kultura diplomatio. Estas tre impona la partopreno de altranguloj, la historiaj referencoj al Mozi kaj Elpin, kaj la efektiva uzo de Esperanto de novaj lernantoj. Kortuŝas la atento al detaloj kaj la respekto inter generacioj kaj popoloj. Ĉinio denove montras sin aktiva centro de Esperanta agado. Koran gratulon al ĉiuj organizantoj kaj kontribuantoj!

Ahmad Mamduhi

## Greka progreso

**1. Daŭras la Lingva Laboratorio por Komencintoj**

Tiu reta kurso daŭris ĝis la fino de junio. La kunsidoj celas plibonigi la parolkapablojn de

lernantoj kun baza (A1) nivelo per interagaj agadoj, rolludoj kaj familiaj scenaroj. La grupo konsistas el kvin partoprenantoj kaj aktivas ekde la komenco de majo.

**2. Paŭzo de "Revoj sur la Trotuaro"**
La semajnaj konversaciaj kunvenoj "Revoj sur la Trotuaro" provizore ĉesis pro malalta partopreno dum la somero. Ili rekomenciĝos en oktobro kun freŝa strukturo kaj reklamo.

**3. Nova rete alirebla gramatiko por greklingvanoj**
Publikiĝis gramatiko de Esperanto por greklingvanoj ĉe: thesperanto.eu/grammatikh
La gramatiko jam allogis atenton:

- 326 unikaj vizitantoj el Grekio, Kipro, Usono, Turkio kaj aliaj
- 856 vizitoj al la gramatikaj paĝoj dum la unuaj tri semajnoj
- Rimarkinda kresko de la meza restodaŭro: de 58 sekundoj al preskaŭ 6 minutoj

La iniciato ligiĝis al reklamkampanjo kaj disvastiĝis ankaŭ pere de sociaj retoj.

**4. SEO-projekto: pli bona troveblo en la greka reto**
Komenciĝis projekto por verki greklingvajn artikolojn celantajn specifajn serĉvortojn kiel: *"Εσπεράντο τι σημαίνει"*, *"Μαθήματα Εσπεράντο στα ελληνικά"*, *"Εσπεράντο στην Ελλάδα"*. La unua aro da tekstoj estos preta antaŭ la mezo de julio kaj celas altiri interesatojn el Grekio kaj Kipro pere de Google.

**5. Libera elŝuto de "Μαθαίνω Εσπεράντο"**
La greka traduko de la lernolibro de Stano Marček, fare de la forpasinta prezidanto **Georgios Dermatis**, estis skanita kaj publikiĝis por senpaga elŝuto: thesperanto.eu/ma8ainw-esperanto. La libro utilas ne nur kiel lernilo, sed ankaŭ omaĝas la historian kontribuon de Dermatis.

**6. Nova serio da A2-tekstoj kun resumo kaj vortaro**
Ekis tekstoj por A2-lernantoj, bazitaj sur rakontoj evoluigitaj kun helpo de artefarita intelekto thesperanto.eu/-kalesmenos-apo-thn-agria-fysh
Ĉiu teksto enhavas Esperantan rakonton, grekan resumon, vortareton kaj foje sonregistraĵon. La celo estas helpi lernantojn kompreni tekstojn flue kaj nefrustre.

**Andreas Zervas, Grekio**

## Financaj rezultoj de UEA

Mi ĝojas prezenti al vi pozitivan rezulton. Kaŭzoj estas la bona rezulto ĉe la moninvestoj kaj la administra subvencio de Eŭropa Unio. La financa stato de UEA pliboniĝis ankaŭ bilance. Ĉe la rezervoj troviĝas du kapitaloj, kiuj transformiĝas en fondaĵoj en 2025. "Huttunen" havos la celon "edukado" kaj la rezervo "Enderby" helpos al agadoj por "Homaj Rajtoj". La bilanco enhavos ankaŭ monon, kiu rilatas al diversaj EU-subvencioj. Tio fortigos la agadon de UEA.
Multaj membroj kontribuis al la sukceso de la UK en Aruŝa. Tio eblis danke al la granda donacemo por financi la kongreson kaj la venigon de multaj afrikanoj al ĝi. UEA daŭre havas defiojn. Mankas detale analizi sur kiuj kampoj ni povas fortigi la asocion kaj kiujn agadojn ni entreprenu. Zorgiga estas la libroservo. Daŭre ni ne trovis solvon por ĝi.
La vendo de la domo ankoraŭ ne okazis, ĉar nuntempe ni povus vendi ĝin nur je malalta prezo. Espereble la vendo-merkato en Nederlando kun reduktiĝantaj rentoj pliboniĝas.
La membraro evoluis bone, sed ni konsciu, ke la kvanto da homoj, kiuj abonas la revuon *Esperanto* papere, reduktiĝas. Ni konsciu, ke sen la grandaj ŝparoj, kiujn ni entreprenis en la lastaj jaroj, UEA daŭre kaj konstante havus deficitojn de ĉ. € 200.000 jare. 2025 la oficistaro kostis al UEA ĉ. tiom. Se UEA daŭre havus la saman oficistaron

en Nederlando kiel en 2016 post inflacia adapto, nun estus elspezoj de ĉ. € 430.000. Ni savis la asocion. Ni frontu la defiojn kaj arde laboru por brila estonteco.

Martin Schäffer, Ĝenerala Direktoro de UEA

## Impona aliĝado al la Balta renkontiĝo

Dek tagojn antaŭ BET-59, kiu komenciĝis la 5-an de julio 2025 en Kaŭno (Litovio), al ĝi aliĝis 264 personoj el 29 landoj. La plej multaj aliĝintoj estas el Litovio – 84. Sekvas Pollando kun 36 aliĝintoj. La nombro da aliĝintoj jam superis tiun de la 56-a BET, kiu okazis somere 2022 en Klajpedo (263 aliĝintoj). Legu la detalan statistikon ĉe https://sezonoj.ru/2025/06/bet-198/

## Plia hungara bitlibro

Hungaria Esperanto-Asocio aperigis en formo de bitlibro du pluajn teatraĵojn de Ferenc Molnár (1878-1952). Unu estas *La nekonata knabino*: historio de junulino, dancigistino kaj amuzistino en mizera dancamuzejo en la haveno de Fiume (***SMG:*** Triesto). Pro kaprica apero tie de grafo ŝi ricevas ŝancon resaniĝi en elita aŭstria sanatorio, kie ŝi trovas ĉion, kion ŝi sopiris en la vivo: amon, familion, respekton kaj varman etoson. Ĝis la sorto intervenas... La alia *Ludo en la kastelo* temas pri dramaturga paro kaj juna komponisto, somerumanta en kastelo ĉe la itala marbordo. Pro la maldikeco de la muro ili aŭdas, kion ili ne volus aŭdi, kaj kio minacas ruinigi la vivon de am-paro. La solvo estas ĉemane: teatra komedio en la komedio de la vivo. La eo-libroj elŝuteblas senpage ĉe: **https://libro.ee/book.php?id=3925**

Jozefo Horvath www.vortaro.hu

## Bibloteka apogo Bachrich: Alvoko 2025

Ĉi-jare UEA disdonos ankoraŭfoje subvenciojn el la Biblioteka Apogo Honore al la geedzoj Johano kaj Maria Bachrich, kiu celas pliriĉigon de Esperantaj bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia ne-movada instanco. La fondaĵo estis starigita en 2014 de komenca kapitalo (20 000 USD) donacita de la familio Bachrich memore al Johano kaj Maria, venezuelaj esperantistoj forpasintaj en 2005 kaj 2011 respektive.

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
ilei UMEA IKEF
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dudek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.